

N°191
juillet
août
septembre
2020

LA INFORMILO

N° 191
julio
aŭgusto
septembro
2020

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

esperanto
France-Est

ESPERANTO



esperanto
★ estas ★
mojosa!

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 18 €

Reta abono: 7,50 €

Ce numéro 191 de LA INFORMILO montre que les espérantophones ne sont pas à court d'idées pour voyager à travers le monde, ces voyages n'étant souvent que virtuels pour cause de pandémie. Il a fallu annuler le mondial de l'espéranto à Montréal, mais cela n'a pas empêché les responsables de l'Association Universelle d'Espéranto

(UEA) d'organiser en peu de temps un congrès universel virtuel auquel ont participé plusieurs milliers de personnes. Sur la lancée, MONDA FESTO, un festival international de la culture, a également permis à des dizaines d'artistes de se présenter à un public disséminé sur les cinq continents. Et tout ceci avec une empreinte carbone quasi nulle! Bravo!



MONDAFESTO 2020
LA MONDA FESTIVALO DE ESPERANTO
20 JUNIO - 20 SEPTEMBRO



Universala Kongreso en Montrealo 2020 prokrastita.

Jam en monato aprilo UEA informis la kongres-aligintojn, ke UK en Montrealo ne povos okazi pro la nuna pandemio de korona viruso. Jen la ricevitaj leteroj:

Estimata kongresano,

Ni esperas ke vi bone fartas. La sano de vi, via familio kaj proksimuloj por ni estas plej grava. Post zorga konsidero de ĉiuj aspektoj de la nuna tutmonda epidemio kaj ĝiaj sekvoj la Estraro de UEA, Centra Oficejo, LKK kaj la kongresejo en Montrealo venis al la konkludo, ke tute ne estus sekure kaj prudente okazigi la UK-on en Montrealo en 2020, kaj laŭ la novaj pli striktaj reguloj de la kebekia registaro pro la epidemio, la okazigo de la UK entute ne eblas. Je nia granda bedaŭro en 2020 ne eblas okazigi Universalan Kongreson de Esperanto. La Estraro de UEA decidis prokrasti la kongreson en Montrealo al la jaro 2022.

Por ke la esperantistoj tamen havu la okazon esti en kontakto kun la cetera E-komunumo en tiu ĉi jaro, estas planata virtuala renkontiĝo. Pliaj informoj pri tio aperos en sekvaj komunikoj de UEA.

Bona novaĵo por vi estas, ke pro la ĉi-jara eksterordinara situacio, la estraro de UEA decidis, ke la pagitaj kongresaj kotizoj por la jaro 2020 povas esti uzitaj por aliĝi al la UK en Belfasto en 2021 Aŭ en Montrealo en 2022. En la aliĝiloj al tiuj du UK-oj eblas tion indiki.

Monda Festivalo de Esperanto kaj Virtuala Kongreso

Pli poste venis informoj pri virtuala kongreso:

Kvankam ni ĉiuj bedaŭras ke ni devis movi nian karan kongreson en Montrealo al la jaro 2022, el niaj sentoj de kuraĝo kaj espero naskiĝis nova ideo: la Monda Festivalo de Esperanto kaj de la Virtuala Kongreso. Ni afable invitas vin legi pri ili ĉe la retejo <https://mondafest.net>. Kaj okaze de tiuj gravaj agadoj ni kun ĝojo invitas vin fariĝi Honora Gasto de la eventoj.

La Monda Festivalo (MondaFest' 2020) havos sian Inaŭguron rete, sabaton, la 20-an de junio 2020, 12:00 UTC, nomatan Somera Inaŭguro. Vi estas bonvena spekti ĝin laŭ la suba programo kaj per la jenaj rimedoj: rekte en la retejo MondaFest.net (<https://mondafest.net/programo/>) kaj en la spacoj de UEA kaj YouTube



Finfine en la semajno de la 1a de aŭgusto ĝis la 8a okazis la virtuala kongreso al kiu ŝajne aliĝis preskaŭ 1900 samideanoj.

Ĉe "Nuna progamo" eblis trovi la kunvenojn, kiuj tiam estis nun planitaj kaj tuj aliri, kvazaŭ oni eniras realan



ĉambron. En iuj kunvenoj mankis gvidanto, tiam la babilado estis tute libera.

Tiu Virtuala Kongreso estis fakte tutmonda, kaj necesis adaptiĝi laŭ la loka hor-zono. Tiam por partoprenantoj el Kanado la kunvenoj okazis ege frue, dum en Eŭropo estis jam tagmezo.



MONDAFEST'2020
LA MONDA FESTIVALO DE ESPERANTO
20 JUNIO - 20 SEPTEMBRO

UEA lanĉis grandegan trimonatan Mondan Festivalon de Esperanto

Nuligo de la Universala Kongreso de Esperanto, kiu devis okazi la unuan semajnon de aŭgusto en Montrealo. Kanado, produktis inversan respondon: okazas pli multa agado en la Esperanto-mondo ol iam antaŭe – kaj ĝi efektive rondiras la mondon. Lanĉite la 20-an de junio, trimonata virtuala Monda Festivalo de Esperanto ne nur inkluzivas tutan serion da aranĝoj ligitaj al Unuiĝintaj Nacioj, sed kunligas multajn aliajn aktivecojn de pluraj aliaj organizoj. La esperantista instruista ligo ILEI okazigas sian unusemajnan jaran kongreson rete, tiel multigante la nombron de partoprenantoj longe preter la nombroj atenditaj por surloka konferenco. La

76-a Internacia Junulara Kongreso havas similajn atendojn – kaj pli kaj pli da organizoj kaptas la okazon de tiu tutmonda festivalo, kiu entenos prelegojn, diskutojn, artajn aranĝojn, koncertojn, kaj multajn aliajn okazojn por aŭdi kaj paroli Esperanton.



Universala Esperanto-Asocio

La lanĉo de la 20a de junio okazis antaŭ spektantaro de pluraj miloj da homoj tra la tuta mondo. La Festivalo prezentis plene internaciajn aranĝojn kaj ankaŭ regionajn renkontiĝojn, tiel faciligante pli efikan kontakton kun Esperanto-parolantoj je ĉiuj niveloj. Inter tiuj kiuj alparolis la malferman ceremonion estis Suba Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, Fabrizio Hochschild, nome de sia organizo. Li laŭdis la Esperanto-movadon pro ties internacia dialogo kaj engaĝiĝo kaj instigis al Esperanto-parolantoj partopreni en la tutmonda enketo nun realigata koncerne la estontecon de UN (<https://un75.online/?lang=epo>).

La mesaĝo de s-ro Hochschild estas spektebla ĉe <https://www.youtube.com/watch?v=kFufDNdgrXo>.

Prezidanto de UEA Duncan Charters alvokis al ĉiuj parolantoj de Esperanto, ke ili kunlaboru por konkeri la krizojn de hodiaŭ, ne nur KOVIM-19 sed ankaŭ armitan konflikton kaj klimatŝanĝiĝon. Eksa UEA-prezidanto kaj nuna Reprezentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj, Humphrey Tonkin, refortigis la mesaĝon de Suba Ĝenerala Sekretario Hochschild, anoncante serion da aranĝoj kiuj ekzamenos la hodiaŭan UN kaj proponos viziojn de ĝia estonteco. La teksto de lia parolado troveblas ĉe


<http://www.esperantoporun.org/parolado-de-humphrey-tonkin-mondafest-20-junio-2020/>.

Pliaj komentoj pri la rilato de UEA kun Unuiĝintaj Nacioj estis prezentitaj de Rakoen Maertens kaj Sara Spanò.

La malferma ceremonio, kunordigita de la Unua Vicprezidanto de UEA Fernando Maia, enhavis kontribuojn kaj muzikon el multaj mondopartoj, inter ili salutojn de estrarano de UEA Jérémie Sabiyumva (Burundo), kaj muziko el la Demokratia Respubliko de Kongo, Brazilo, Francio, kaj la Korea Respubliko. Dum la pasintaj kelkaj tagoj okazis Tago dediĉita al Mezoriento kaj Norda Afriko, organizita de la komisiono de UEA por tiu regiono, kaj Tago de Azio kaj Oceanio. Pri estontaj aranĝoj vidu

<https://mondafest.net/programo/>

La Universala Kongreso de Esperanto tamen okazos kiel virtuala aranĝo de la 1a ĝis la 8a de aŭgusto. Detalojn oni anoncos dum la nuna monato.




GRANDA SUKCESO DE LA SOMERAJ VIRTUALAJ KUNVENOJ EN ESPERANTUJO

Disvolviĝis ĝis la 20a de septembro, la Monda Festivalo de Esperanto, MondaFest' 2020, organizita de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) por anstataŭi virtuale la kongresojn kaj aliajn Esperanto-renkontiĝojn normale disvolviĝintajn dum la somero, organizitajn de tiu ĉi asocio aŭ aliaj rilataj. Dum la monatoj julio kaj aŭgusto okazis interalie la Virtuala Kongreso (VK), anstataŭanto de la tradicia Universala Kongreso, kaj ankaŭ la Internacia Junulara Kongreso kaj la konferenco de ILEI.

Eĉ se nenio povas anstataŭi la senperan interhoman kontakton, la virtualaj renkontoj taŭgis tamen kiel rimedo por plu ĝui la kulturon en Esperanto. Bone organizitaj, kun riĉa programo, ili estis ĝuitaj de la parolantoj de la lingvo, multaj el kiuj, pro ekonomiaj aŭ tempaj kialoj, ne estus povintaj partopreni en ĉeestaj renkontoj. La sperto estis tiel pozitiva ke oni planas, por venontaj jaroj, konservi iun virtualan parton en la internaciaj renkontiĝoj, ĝuste por ebligi la partoprenon, eĉ se je distanco, al tiaj interesitoj.


ANKAŬ LA CEREMONIO DE LA BELARTAJ KONKURSOJ OKAZIS VIRTUALE

La Premia Festo de la Belartaj Konkursoj fariĝis lastatempe la kulmina momento de la plej klasika manifestiĝo de la Esperanta kulturo. La Komisiono de la Belartaj Konkursoj, por kiu rolas kiel prezidanto kaj sekretario respektive Miguel Fernández Martín kaj Miguel Gutiérrez Adúriz, rigardante la ceremonion de disdono de la premioj kiel eron de spektaklo konceptata por kunĝuado de la Esperanto-kulturo, ĉijare decidis organizi la BK-Feston virtuale.



La nova tunelo de Sankta-Gotardo en 2016

En la jaro 2016 (7a de junio) estis inaŭgurita la plej longa tunelo en la mondo. Temas pri fervoja tunelo, 57 km longa, en Svisio, kiu ebligos pli rapidan, pli densajn rilatojn inter la urboj Zuriko kaj Milano kaj ĉefe inter Nordo kaj Sudo de Eŭropo. Ĝi estas do pli longa je 3,2 km ol la japana tunelo de Seikan kaj je 7 km pli ol la tunelo sub la Manika Markolo inter Francio kaj Britio. Tiu tunelo estas la ĉefa parto de pli larĝa fervoja projekto "AlpTransit Gotthard".




Ne hazarde tia vorko estas plenumita en Svisio, lando kiu decidis delonge, ke la aŭtomobila kaj kamiona trafikoj ne venenu la landon kaj kiu ĉiam donis gravan preferon al la trajnoj, precipe por transporti varojn. La lokigo de la nova tunelo ankaŭ ne estas surprizo, ĉar en 1882 sub la sama montaro estis konstruita tunelo, kiu restis la plej longa dum multaj jaroj. (vidu ĉi-poste)

Kompare al la malnova tunelo, 15km longa, kiu situas pli alte, la nova tunelo nomiĝas "baza tunelo" ĉar ĝi estas konstruita je la alteco de 550m super la mar-nivelo, tio estas je la nivelo de la alvena ebena.

Kiam la lasta parto de ĝia projekto (la tunelo de Ceneri 15km) estos finita en 2019, la trajnoj bezonos nur 2 horojn 50 mn por aliri de Zuriko al Milano (antaŭe 4 h 10). Fakte, la plimulton de la trajnoj konsistigos var-trajnoj, ĉar Svisio fariĝis ne-preterpasebla parto de la transporto-itineroj inter norda Eŭropo (precipe la haveno Roterdamo) kaj Italio.

La malnova tunelo

La unua Tunelo de Sankta-Gotardo "firsta tunelo" estis konstruita de 1872 ĝis 1881. Ĝia norda enirejo situis je 1106m kaj la suda je 1142m laŭ alteco. Por supreniri ĝis la enirejo la trajnoj devis malrapide sekvi linion kun *helik-formaj tuneloj*. Parta mapo de tiaj fervojaj tuneloj aperas ĉi sube:



Bildo 1: Parta mapo de la linio al la malnova tunelo, pli alta.

Tio estis la nura solvo trovita por eviti tro fortajn deklivojn. Sur la buklo videbla dekstre, cirkla tunelo pasas super si-mem! Krome, ĉe la bazo de ambaŭ deklivoj, la trajnoj devis halti, por ke al ili oni alkroĉu unu aŭ du pliajn lokomotivojn: sen

ili, la var-trajnoj ne povus grimpi (sur deklivo de 26m je kilometro) ĝis la firsta tunelo)

Evidente, per tia vojo ne eblis rapideco! Nuntempe, post la ĵusa malfermo de la baza tunelo, la svisa fervoja kompanio decidis konservi la malnovan linion, por la plezuro de turistoj.

La nova tunelo

Ekde nun la trajnoj por vojaĝantoj povos transiri sub la montaro je la rapideco de 250 km/h (maksimume)

Laŭ CFF (Svisaj fervojoj) estas antaŭvidite ĝis 50 vojaĝ-trajnoj tage kaj 10 var-trajnoj hore. La realecon de tiaj ciferoj montras la estontaj statistikoj.

En 1993 estis faritaj la unuaj bor-laboroj por analizi la terenon; 4 jarojn poste, oni ekboris la krom-galeriojn, kaj la unuaj borlaboroj de la baza tunelo komenciĝis nur en 2003. . .

Por adaptiĝi al la tereno, eviti kelkajn obstaklojn (kiel val-digon) kaj restigi la tunelon kiel eble plej proksima de la surfaco, la tunelo ne estas plene rekt-linia, sed iomete So-forma. Tiel la konstruado de la kromaj (teknikaj) galerioj malpli kostis.


La tunelo konsistas el du paralelaj unutrakaj tuboj plus 178 komunikaj koridoroj. Tiel, la 57 km de la tunelo dividiĝas en partoj preskaŭ egal-longaj.

Krome, pli-malpli egal-distance de la enirejo kaj de la elirejo, la konstruistoj konstruigis du mult-funkciajn staciojn: Sedrun kaj Faido. (vidu skemon pli poste)


En tiuj stacioj, se necese, la trajnoj povas veturi al la alia trako; estas ankaŭ ebleco eliri (piede) el la tunelo per lifto (Sedrun) aŭ per teknika galerio, laŭ la ĉi-suba skemo:



Bildo 2: trajno en la nova tunelo



Mapo de la baza tunelo kun ĝiaj stacioj



Bildo 3: mapo de la tunelo

Estas iom malfacile imagi, kiom da problemoj estis solvendaj por plenumi tiun gigantan laboron. Imagu! La konstruistoj entute boris pli ol 152 km da tuneloj, se oni adicias la du ĉefajn tubojn, la du ŝaftojn de la stacio Sedrun kaj ties galeriojn, la alirajn galeriojn de Amsteg kaj Faido kaj la komunikajn koridorojn.

Bildo 4:Skemo de la du-tuba tunelo kun ties mult-funkciaj stacioj kaj aliraj galerioj. Observu la sekcon de ambaŭ tuboj kun komunika koridoro.

Ankaŭ notu bone la sav-staciojn, kiuj utilis kaze de akcidento. Kvar tunelo-partoj estis samtempe boritaj, dank'al **tunel-bormaŝinoj** kiuj boris entute pli ol 100 km da rokaĵoj. Ĝenerale, bor-maŝino boris 10 ĝis 14 metrojn tage. Sed je la 18 / 07 / 2009 unu atingis 56 m! Tamen la 50 km pliajn oni devis bori per eksplodaĵoj, pro la konsisto de la tereno. Fine ĉiuj partoj plej precize samliniigis (je 2 cm da tolero!) Plian fojon, ni admiru la svisan precizecon! (vidu la sekvan bildon)

Laŭ donitaj ciferoj, 28 milionoj da rokaj tunoj estis eltiritaj! (laŭ evaluoj, kvinoble la volumeno de la egipta Granda Piramido!) El parto da tiuj rubaĵoj, oni produktis 5 milionojn da beton-tunoj, kiujn oni uzis por plifortigi la tunelajn volbojn: tio estis necesa fine de la tunel-boradaj laboroj.

Poste, disvolviĝis longa laboro por provizi la tunelojn per elektraj retoj, signaliloj, fervojaj ekipaĵoj ktp.

Ĉu tro longa labor-tempo? De 1993 ĝis 2016 pasis 23 jaroj. Tio aspektas iom longega, sed ne, la antaŭviditaj lim-tempoj estis plenumitaj. Ĉirkaŭ 3 000 entreprenoj partoprenis la laboron (ne ĉiuj samtempe, kompreneble!) Tio implicas tre rigoran organizadon por efike kunlaborigi ĝis 6 000 dungitojn. Ĉiel la mon-punoj, en la kontrakto antaŭviditaj, pro eventualaj malfruoj kostis 1000 000 € por semajno. Sukceso estis deviga!

Plie la buĝeto ne suferis pro pliaj kostoj, kiel okazas ofte: 13,2 miliardoj da Svisaj frankoj (tiam ekvivalentaj al pli ol 11 miliardoj da eŭroj). Tiu sumo estis aprobita per referendumo en 1992. Estas bone scii, ke 2/3 de tia buĝeto estas provizitaj per imposto sur kamionoj.




Bildo 5: Ĉe la bazo de giganta tunel-bormaŝino, laboristoj festas la kunligon de du tunel-partoj. Observante la standardojn, notu la internaciecon de la dungitaro.



Bildo 6: Kunligo de ŝanĝ-trakoj en Faïdo



Skemoj el la reto



Fontoj: http://www.lemonde.fr/economie/article/2016/05/31/saint-gothard-la-suisse-voit-le-bout-du-tunnel_4929482_3234.html
https://fr.wikipedia.org/wiki/Tunnel_de_base_du_Saint-Gothard
 Fotoj: <https://commons.wikimedia.org>

ESPERANTO en BENINO



Edukada projekto de ACM Benino. Ekde pli-malpli du jaroj, Afrika Centro Mondcivitana/ACM Benino ne povas taŭge agadi pro manko de financado. ACM ne kapablis ion fari al la geinfanoj sub ACM kiel antaŭe. Ĝi tamen progresas en la instruado de Esperanto. Ĉi-jare ACM decidis lanĉi alvokon por havi lerno-materialon kaj por subteni la lerno-koston. Ni bonvenigas lernejaĵojn, donacojn cele al la kleriga subtenado por la orfoj.

La venonta novlerneja jaro komenciĝos en septembro 2020. Bv viziti nian paĝon por konatiĝi kun niaj aktivaĵoj: www.acmbenin.org

Ni invitas kaj petas de vi ĉiuj subteni nian agadojn. PayPal konto: acmbenin@razokama.de Verkis, François Hounsounou, Prezidanto- fondinto de ACM Benino. François (Franko) HOUNSOUNOU, BP 226 Lokossa-Mono Rép. du Bénin Skype: [esperantoawc](https://www.skype.com/user/esperantoawc) www.acmbenin.org

Pikniko en Piquet en la valo de la rivero Yon.

Estis bonaj surprizoj: neatendite pro Covim-19 la nombro da partoprenintoj superis 20. Inter ili estis Laura Ledoux kaj Benoît Richard, kiuj bicikle vojaĝis helpe de Esperanto de La Ferrière al Japanio, Céline Bernard, direktorino de la publikaĵo “Espéranto-Info”, el la departemento Tarn, invititaj de Claudie Demongeot, prezidantino de la asocio *Réinsertion et Espéranto*, kaj Robert Allandrieu, kiuj kunlaboras al la sama revuo, Monique Assailly de la asocio Esperanto 79, el la najbara orienta departemento Deux-Sèvres.



La etoso estis amika, kvieta. Estis fakte pli da interŝanĝoj pri ol en Esperanto kaj multe pli pri diversajoj. Céline kunportis ekzemplerojn de la revuo “Espéranto-Info “ (majo-aŭgusto 2020) riĉa je informoj, ilustraĵoj kaj fotoj i.a. pri la Mediteranea Esperanto-Semajno, la junulara pola Rok’festivalo “Pol-and-Rock”, pri COVIM-19. Du paĝoj estas dediĉitaj, dulingve, al raporto pri la renkontiĝo okazinta en Angers pri la temo “Voyager autrement” (Vojaĝi alimaniere). Tiel, Nathalie Rigault trairis Francion dum kvar monatoj kun du el siaj infanoj per ĉevaloj. Pri tio ŝi verkis libron “En toute liberté” (En kompleta libereco). Bruno kaj Maryvonne Robineau, la plej konataj, iel pioniroj, preskaŭ veteranoj, rakontis sian 8-jaran piediran vojaĝon ĉirkaŭ la mondo pri kiu ili publikigis libron unue sub la titolo “Et leur vie, c'est la terre” (Kaj ilia vivo estas la tero) kaj poste “8 ans autour du monde “ (Dum 8 jaroj ĉirkaŭ la mondo).

Intervenis ankaŭ Laura Ledoux kaj Benoît Richard.

Espéranto France-Est http://esperanto.france.est.free.fr.				Orient-Franca Esperanto-Asocio.	
La Informilo		Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO		Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO	
Rédaction: Redaktoro:		Edmond Ludwig kaj André Grossmann		S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:		Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci		un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre	
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.					
Komitato de la Asocio			Comité de l'Association		
Funkcio		Adreso		Telefono	
Ret-adreso		Telefono		Ret-adreso	
Prezidanto <i>Président et secrétaire</i>		S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR		03.89.77.52.56 esperanto.eludwig@orange.fr	
Help-sekretariino <i>Secrétaire-adjointe</i>		S-ino Liliane BERSWEILER 1 chemin du Lacé 54990 XEUILLEY		03.83.47.41.36 06 76 54 77 78 liliber54@yahoo.fr	
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>		S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		09.86.38.78.61 andreo.ag15@sfr.fr	
Libroservo <i>Service Librairie</i> Vic-prezidanto		S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE		03.83.53.57.54 jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net	
Aliaj komitatanoj		S-ro Robert KUENY		09.71.31.37.62 kueny.robert@orange.fr	
<i>Assesseurs</i>		S-ino Micheline COLNOT		03.83.27.46.93 michelinecolnot@orange.fr	
		S-ro Jacques HERLÉ		03.87.01.00.39 jacques.herle@laposte.net	
		S-ro Michel BASSO		03.89.80.86.12 clbm@orange.fr	
		S-ino Gisèle BERTAPELLE		03.83.56.17.37 06.80.68.94.78 bertapelle.gisele@wanadoo.fr	
		S-ino Catherine HEL		03.83.47.63.07 cathello@laposte.net	
		S-ro Gilbert STAMMBACH		06 87 40 01 16 gilbert.stammach@gmail.com	
Abono al La Informilo →		18 eŭroj		reta abono: 7,50 eŭroj	
← <i>Abonnement à La Informilo</i>					
Pagoj per ĉeko je la nomo de →		Esperanto France-Est		← <i>Paiement par chèque au nom de</i>	
Pagoj per ĝiro al jena konto →		CCP 1997 72 W NANCY		← <i>Paiement par virement au compte</i>	
Per internacia ĝiro →		IBAN: FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC: PSSTFRPPNCY			
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →		S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier	
1. Monda Festo kaj virtuala UK		15. Libroservo+ Podkasto		ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 Bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Espéranto France-Est MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : 30 septembre 2013 <i>Imprimé par l'imprimerie Sprenger</i>	
2. UK en Montrealo prokrastita		16. Libro: Sen Familio			
3. Monda Festivalo de Esperanto		17. Luminesk Münster			
4. Virtualoj Kunvenoj		18. Staĝo Esperanto-koruso			
5. La nova tunelo Sankta Gotardo		19. Enigmaj kaj anekdotoj			
6. La nova tunelo Sankta Gotardo		20. Anekdotoj + rakontoj			
7. La nova tunelo Sankta Gotardo		21. Abonoj kaj kotizoj			
8. Esperanto en Benino + pikniko		22. Nova eldonaĵo + Filmo			
9. Komitatanoj kaj enhavo		23. Amika tago en Freiburg			
10. Angulo de la prezidanto		24. Staĝo en Metabief Aŭgusto			
11. Grezijono en aŭgusto		25. Staĝo en Metabief Aŭgusto			
12. Aŭtuno: Staĝoj		26. Staĝo en Metabief Aŭgusto			
13. Libro + Maskoj		27. Staĝo en Metabief Aŭgusto			
14. Libro-servo.		28. Foto-paĝo			



Karaj gesamideanoj,

Vi trafolumas ree numeron de LA INFORMILO, kiu aperas dum nova ekiĝo de la kronviroza pandemio. Tiu virusaĉo certe ĝenas nian asocian vivon kaj malhelpas normalan funkciadon de la asocio.

Malgraŭ ĉiuj malhelpaĵoj kaj dank'al la klopodoj de nia fervora samideano André GROSSMANN vi nun legas nian revuon kaj vi konstatas, ke malgraŭ la pandemio plej diversaj eventoj okazis dum la lasta trimestro, aŭ realaj kunvenoj, aŭ multegaj virtualaj festoj kaj kongresoj.

En nia regiona asocio nia samideano Armand HUBERT ebligis al ni eldoni en de li mem ilustrita libreto liajn sinsekvajn kontribuojn de AVULA ANGULO sub la titolo ***Gardu vin, knabo!*** Jen bela okazo por donaci al viaj en- kaj ekster-landaj geamikoj bildon de la suferoj de niaj regionanoj dum la Dua Mondmilito.

Vi ankaŭ malkovras, ke nia kunlaboranta asocio TAKE-ESPERANTO denove proponas ĉe sia retadreso domovar@orange.fr protektajn kontraŭvirusajn maskojn. Kun-agadis kun Michel BASSO komercistoj de IKEF (Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo). Aĉetante tiujn maskojn vi samtempe helpos al la esperantistaj medicinistoj de UEA (Universala Medicina Esperanto-Asocio).

Ĉiuj tiuj praktikaj realigoj fare de esperantistoj kuraĝigu nin kaj nasku en ni la esperon, ke baldaŭ pliaj samideanoj de Espéranto France-Est aktive kunlaboros kun ni, sin prezentante en la venontaj jaroj kiel kandidatoj por la komitato.

E. L.

Forpasis la 20-an de junio 2020 en Villingen nia germana samideano Josef Schiffer, unu inter la fondintoj de BAVELO kaj fondinto de la Esperanto-Grupo de Villingen.

Josef Schiffer estis ankaŭ la verkinto de la propra mem-eldonata "Lern-metodo Schiffer", kiu ebligas al ĉiu lernanto de grupo antaŭeniri propriritme en la lernado

de la lingvo. Li same verkis mem-eldone gramatikon de Esperanto.

La Badenvirtemberga Esperanto-Ligo lin nomis Honora Membro de la asocio.

La estraro de Espéranto-France-Est kondolencas plej sincere al la familio.

Edmond LUDWIG

Fiŝkaptista rakonto

Letero de leganto pri kortuŝa okazaĵo en la franca ĵurnalo "Rustica", esperantigita de H. W. Grossmann el germana traduko, kiu povus ĝojigi vin. Tiom da negativaj raportoj el la mondo, en kiu ni vivas, ĉiutage atingas nin pri perfortoj, malhonesteco, medi-poluado. Jen, pozitiva rakonto.

Okazis en julio. La aero estis pura. Milda venteto krispigis la ondojn. La birdoj kantis en la arbustoj. Mi fikse observis la naĝilon, ĉar mi kaptis fiŝojn per semoj de kanabo uzante bastonon. Subite, flugila brueto vekis atenton. Kolombo ĉirkaŭ-flugis min. Tiam ĝi staris ĉe la bordo kaj volis trinki akvon, sed ne sukcesis, ĉar la akvo-nivelo estis tro malalta. Jam surprizita, ke ĝi alteriĝis tiel proksime de mi, mi vidis ĝin alflugi mian bastonon. Nun mi komprenis, ke ĝi nepre volas trinki. Do mi malaltigis la bastonon tre proksimen al la akvo, kaj la birdo plezure refreŝiĝis. Per stranga kliniĝo ĝi kvazaŭ dankis kaj forflugis. Mi estas ankoraŭ tute perpleksa!

Sentemo kaj fido flanke de la birdo, plezuro kaj ĝojo flanke de la fiŝisto, kiu estas impresita kaj emociigita de la servo, kiun la inteligenta kaj decidema animalo petis de li kaj kiun li ne seniluziigis.



PRINTEMPO

Ĝuu semajnon en la Esperanto-kastelo!
17-25 de aprilo 2020

De la 17a ĝis 25a de aprilo okazos en la franca Esperanto-kastelo Greziljono intensivaj kursoj en 4 niveloj kaj KER-ekzamenoj, legu: gresillon.org/printempas

Tiaj estis la planoj por ĉi-tiu printempo, sed pro la epidemio de koron-viruso ili estis tute nuligitaj. Tamen ekde julio 2020 la kastelo povis denove akcepti esperantistojn. Pierre Grollemund raportas pri sia restado tie ekde la 10a de aŭgusto.



Jes la kastelo de Greziljono daŭre funkcias, ĝi estas fama ...en esperantujo. Ĝi situas apud la urbeto Baugé en Anjou (30 km for de Angers) Jam de 1951, ĝi fariĝis la ĉefa renkontejo en Francio, precipe por staĝoj, kongresoj, renkontiĝoj. De kelkaj jaroj, la bontenado de la kastelo devigis la administran teamon malfermi la kastelon al ne-esperantistaj eventoj (ekzemple: por geedziĝoj, kunvenoj de diversaj asocioj) Tio ebligis iom enspezi por daŭre bonteni la kastelon: estas multo farenda: ekipi ĉambrojn por handikapitoj, renovigi tegmentojn iom post -iome, modernigi la kuirejon, bonteni la ekzistantajn ĉambrojn, ktp, ktp)

https://fr.wikipedia.org/wiki/Ch%C3%A2teau_de_Gr%C3%A9sillon

Komence de julio 2020, ĉar la Universala Kongreso ne povis okazi en Montreal, multaj esperantistoj en la mondo sekvis la VK = Virtualan Kongreson, rapide organizitan de UEA. Dum tuta semajno, estis ebleco rigardi spektaklojn, ĉeesti debatojn aŭ prezentadojn de plej diversaj esperanto-asocioj.

En la posta semajno, de la 10a ĝis la 13a de aŭgusto, okazis serio da OSIEK-prelegoj

Jen ĝia listo:

- UNESKO baldaŭ 70 jara far François Lo Jacomo
- PROVenco, Marsejlo far Renée Triolle
- Konflikto en orienta UKRAINIO far Ulrich Brandenburg (eksdipomato ĉe NATO)
- Debato kaj diskutado pri la KRON-VIRUSO Kovim-19
- Spertoj pri INCENDIOJ en AUSTRALIO 2019 far Rainer Kurz .
- BRULINTAJ KATEDRALOJ: kiel restaŭri ilin ? far Pierre Grollemund
- URALO, malbone konata regiono inter Eŭropo kaj Azio far Renée Triolle
- LIBRO-KULTURO far P. Fischer
- VIKTOR LEBRUN, sekretario de Tolstoï far Renée triolle
- BAUHAUS, ekonomia konstru-metodo en Germanio far Peter Kühnel.

Evidente, tiuj prelegoj ne disvolviĝis dum la daŭro de tutaj tagoj, sed precipe post-tagmeze kaj vespere. Dume, eblis promenadi en la ĉirkaŭaĵoj, libere babili kun renkontitaj esperantistoj.

La eventoj en la Kastelo de Greziljono plu okazos, ekzemple la Ĝenerala Jar-Kunveno de EDE (Eŭropo Demokrateco Esperanto) inter la 21a kaj la 23a de aŭgusto.



Gaja aktiva semajnfino la 23a - 25a oktobro 2020 en Rottweil
La aranĝo okazas en la Junulargastejo de Rottweil
Informoj aperis en la lasta Informilo 190 kaj en la retejo de EFE

Jen la lastaj novaĵoj ricevitaĵoj de Alois Eder.

Gaja? Aktiva? Kio estos aparta en tiu Rottweil'a Esperanto-kunveno?

Tempoj ŝanĝiĝas kaj Esperanto-eventoj kun ili. Ne nur korono, ankaŭ la diĝitigo devigas nin al adapto de la metodoj. Komprenu – ho jes: kun-prenu viajn maskojn, higieno estos imperativo ankaŭ en Rottweil. Kun-prenu ankaŭ vian kreokapablon. Ĉar ni lernos tie unu de la alia, ne havos tradicistilan, sed inter-komprenan, do aktivan seminarion. Kial tio? Pripensu: preskaŭ ĉiuj novaj esperantanoj nuntempe studis Esperanton per interretaj rimedoj. Tiuj novebakitaj samideanoj kompreneble sopiras uzi sian nove akiritan lingvokapablon ne nur skribe, ne nur interrete, sed ankaŭ babile kun vivantaj homoj, kun eblaj estontaj geamikoj. Ĉiu volas apliki sian lingvon kun geamikoj. Ni, la spertaj parolantoj, bonvenigu niajn novulojn.

En Rottweil vi lernos koni imponan urbon: antikvan kaj modernegan. Per profesia esperantlingva ĉiĉerono: Christoph Frank estas Rottweil'ano, oficiala urbo-ĉiĉerono, esperantisto, sed ankaŭ pupteatra kaj magiista aktoro. Kaj aŭtoro de infanlibroj. Christoph kaj Ines Frank uzas Esperanton kiel familian lingvon. Venu kaj vidu la tutan pejzaĝon ĉirkaŭ Rottweil el la plej alta platformo, la Thyssen-turo kun la fulmrapida supermoderna lifto. Venu kaj babilu, rigardu kaj amikumu!

Aŭtune: Staĝoj en Gresijono kaj en Kvinpetalo

Stage AŬTUNE du 25 octobre au 1 novembre à Grésillon

Cours "Parole et Polissage (B2-C1)" avec Tim Morley (Grande Bretagne)

Cours pour progressants (A2-B1) avec Maja Mériaux ou Laurent Peuch:

Cours pour débutants (A1-A2) avec Xavier Godivier

Atelier de théâtre avec Laurent Peuch Activités pour enfants avec Elisabeth Barbay:

Pratique de l'esp. par des jeux le matin. Autour du thème d'Halloween l'après-midi Activités sportives: kayak, accrobranche, piscine, Boule de fort, vélo, ping-pong, pétanque Atelier de méditation avec Xavier Godivier.

Conférences de photos, films, films muets Jeux pour tous: jeux de société, scrabble. . .

voir en ligne: gresillon.org/automne -- en Esperanto gresillon.org/autuno -- inscription: gresillon.org/inscription

Stage du 19 au 23 octobre, à Kvinpetalo, Bouresse.

Le cours s'adresse aux débutants, faux débutants, mais aussi aux élèves plus avancés... Cours en petits groupes, pédagogie adaptée, ambiance familiale.

Catherine Kremer, guide conférencière, prendra en charge le **cours de conversation en espéranto**. Les thèmes liés au tourisme seront utilisés pour lancer des discussions basées sur l'histoire, l'art, l'architecture. Venez avec vos propres anecdotes, des légendes liées à votre région. De même, si vous disposez de photos de famille, n'hésitez pas à en apporter : nous organiserons des groupes de travail autour de ces documents. Jeux au programme !

Parallèlement:

Etudes pour le troisième degré

Pour ceux qui maîtrisent déjà la langue, **Brian Moon**, vice-président de l'Académie d'espéranto, propose d'approfondir leur connaissance de la culture espéranto. Sur la base du programme du Certificat d'études supérieures de [l'Institut Français d'Espéranto](http://www.institut-francais-espanto.org), nous consacrerons cinq journées à étudier les livres qui sont au programme de cet examen, tout en pratiquant d'autres exercices linguistiques.

Un ensemble d'activités qui devraient intéresser également ceux qui n'envisagent pas de passer l'examen.

Attention: en raison des règles sanitaires, nombre de participants limité, afin que chacun dispose de lavabo, WC, douches individuels (sauf pour les couples).

http://www.kvinpetalo.org/IMG/pdf/bulletin_d_inscription_2016.pdf

“La cerbo estas ilo kun riskoj kaj kromefikoj”

La Eldonejo KAVA-PECH ĵus aperigis novan faklibron pri psikologio: “Ne kredu ĉion, kion vi pensas” de Valerija Sipos kaj Ulrich Schweiger. La originalo “Glauben Sie nicht alles, was Sie denken” aperis ĉe la eldonejo Herder, la esperantan tradukon ni dankas al Alois Eder.

La aŭtoroj estas psikoterapiistoj dum pli ol tridek jaroj, kaj ili praktikis en pluraj klinikoj, do havas multajn spertojn. Ilia terapio baziĝas sur la intertempe evoluinta “kogna kondutoterapio”, kiu aplikas la rezultojn de la moderna esploro pri la funkcio de la cerbo, ekzemple tiu farita pere de komputila tomografio (KT), kiu kapablas per ekstreme fajnaj “tranĉado” komputile rekonstrui 3-dimensian “bildon” de vivanta, aktiva cerbo dum la solvado de certaj taskoj.

Aparte interesa en ĉi-libro estas unuflanke la klarigoj, kiel kaj el kio evoluis certaj kondutoj, kaj aliflanke la granda kvanto da kazopriskriboj, kiuj vigligas la legadon kaj ofte permesas, demandi sin mem: “Ĉu tio povus okazi al mi?” Kun tiuj ekzemploj eblas, kvazaŭ en spegulo ekkoni sin mem, “reflekti” la proprajn kondutojn kaj eble liberigi sin de ĝenaj konduttendencoj, ĉu hereditaj, ĉu aledukitaj.

Al mi persone plej imponas la ĉapitro pri la emocioj: ili “estas gravaj elementoj de la ilarkesto, kiujn la cerbo tenas pretaj por la stirado de la konduto”. La dekkvar subĉapitroj pritraktas emociojn kiel ĝojo kaj fiero, ĵaluzo kaj honto, kaj por ĉiu emocio la aŭtoroj sisteme klarigas ties konduton kaj celon, listigas la specifajn “kromefikojn” kaj proponas kontraŭ-direktan agadon por mildigi la kromefikojn, ĉio spicita kun unu, foje pluraj kazekzemploj.

La libro leĝere legiĝas. Kiam la aŭtoroj uzas fakterminojn, ili simplavorte klarigas tiujn en piednotoj, tiel la legantoj kvazaŭ “apude” povas lerni pri la fako. La tradukinto lerte transprenas ĉi tiun leĝeran stilon kaj plie aldonas proprajn piednotojn (“rimarkigoj de la tradukinto”) parte por plue klarigi rarajn vortojn, parte por peri tipaĵojn de la “germana kulturo” al la mondo. Por konkeri la fakan vort-trezoron tre helpas lia libro-fina listo de gravaj nocioj kun indiko, en kiu ĉapitro ili estas klarigitaj.

La tradukita libro estas valora riĉigo de la esperantlingva fakliteraturo. Vi povas mendi ĝin interalie ĉe nia libroservo.

Ursula Niesert

UNU-UZAJ PROTEKTAJ MASKOJ

Eblas havi maskojn rekte de esperantistoj el Ĉinio aŭ Alzaco.

(La sendado estis farita dank'al membroj de IKEF (esperantistaj komercistoj)

Unu-uzaj protektaj maskoj -

Publika prezo: 20 eŭroj skatolo de 50.

SPECIALA PREZO por esperantistoj : 10 EUROJ + sendkostoj aŭ grupe al esperanto-klubo.

Saketo da 10 maskoj : 2,20 eŭroj.

Laveblaj maskoj blankaj (100% faritaj en Alzaco pere de Alsace Textile): 2,50 eŭroj unu masko.

(en la kazo ke vi dezirus la vorton "Esperanto" sur masko, ankaŭ eblas senpaga surkribaĵo)

En stoko ĉe asocio TAKE-ESPERANTO en WINTZENHEIM 10.000 maskoj.

Jam triono rezervitaj.

Aldone teknikaj informoj.

Por mendo : domovar@orange.fr

TAKE-ESPERANTO

90,Rue du Tiefenbach

68920 WINTZENHEIM

Tel: 0389793227

clbm@orange.fr



Dimensio plata : 17.5 x 9.5 cm

Bakteria Filtra Efikeco (BFE) > 95%

Normoj : EN149:2001+A1:2009 - CE: PPE-EN149 - GB/T32610-2016

Limdato de uzo : du jaroj

Loko de fabrikado : Anhui - Ĉinio

Importa firmao : Domovar - Francio

Lingvo en komercado : Esperanto

Unu centimo po masko donace al UMEA (Universala Medicina Esperanto Asocio)

Paketo entenas 50 maskoj (19.2x10.2x8.6 cm) Kvalita atestilo en la paketo.





El nia libroservo

Informoj



⇒ Ĉu la libroservo partoprenos la gajan semajnfinojn planitan de Bavelo la 23/25ajn de oktobro ? Jen bona demando!

Kiam tiu paĝo estis preparita, la informoj de niaj bavelaj samideanoj indikas, ke eblos kunveni 30 partoprenantojn kaj ke reduktita libroservo kun almenaŭ la novaj libroj povos aktivi.

Sed la pandemio ŝajnas nuntempe denove kreski. Se la leĝaj reguloj severiĝos, la partopreno eble estos nuligita !

Ĝis eble baldaŭ!

Jean-Luc Thibias
libroservo.efe@laposte.net

⇒ La listo de libroj aperas en esperanto.france.est.free.fr



Nove alvenintaj libroj

1. Ne kredu ĉion kion vi pensas, Scienco, Valeria Sipos/Ulrich Schweiger Kava Pech, 2020, 304 p, 18€. Traduko de Alois Eder.

Pri riskoj kaj kromefikoj de via cerbo legu ĉi tiun libron!

La cerbo estas la plej granda mirindaĵo, kiun la homa korpo povas prezenti. Ĝi estas ekstreme utila ilo. Sed se vi tro naivkrede uzas ĝin, ekestas danĝeroj kaj riskoj.

La informoriĉa kaj profunda faklibro priskribas en distra stilo, kiamaniere per ĝusta kompreno de la riskoj kaj kromefikoj de la cerbo vi povas efike apogi vian psikan sanon.

La aŭtoroj estas delonge praktikantaj fakuloj kaj konatigas vin kun konkretaj instrukcioj, kiuj baziĝas sur la plej novaj rezultoj de la cerboesploro, psikiatrio kaj klinika psikoterapio.

Kun multaj kazo-ekzemploj. (komentoj el retejo de Kava Pech),




①

2. Sen familio, romano Hector Malot, kun-tradukita de Ana Songanta kaj Michel Fontaine

Vidu ĉiujn informojn en la aparta anonco en la Informilo

Pli simplas rekte mendi ĉe la aŭtoro laŭ la indikitaj retadreso.



②


Por mendi librojn:

- Vi sendas vian mendon
 - per poŝto al: Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE FR-54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉi-suban mendilon)
 - per ret-poŝto al "libroservo.efe@laposte.net" - nur escepte per telefono: 06-77-90-49-61.
- Vi baldaŭ ricevos la librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj), pagenda (indikante faktur-numeron) ĉu per:
 - franca ĉeko je "Esperanto France Est" sendita al la supra adreso
 - poŝta ĝiro al "Esperanto France Est" CCP 0 1997 72W NANCY"
 - interbanka ĝiro al "Esperanto France Est" IBAN FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC PSSTFRPPNCY.


Mendilo		Bonvolu sendi tiujn librojn al apuda adreso:
S-ro / S-ino		
En	la	Subskribo:



Nove alvenintaj libroj el Flandra Esperanto Ligo:



①



②



③



④

1 Kvin kverkoj kaj la sekvo, Romano, **Christian Declerk**, Stafeto – F. E. L., 2019, 372p, 20 €. La aŭtoro mem skribas en sia enkonduko: “Mi nomas ĉi libron romano, sciante ke ĝi ne estas pure aŭ tute tio. Verki veran romanon kiel verkisto-rakontanto, kiom agrable tio ŝajnas al mi. Jes. Sed evidentas ke tion mi ne kapablas: mi miksis en mia fabulo tro da fremdaj elementoj: citaĵojn, listojn, dokumentojn, ideojn, longajn deviojn kaj ekzemplojn, biografiajn donitaĵojn. Nepras alinomi mian verkon. Ĉu dokumenta romano?” (el F. E. L. retejo).

2 Murdo en la teatro, romano, **Ronald Cecil Gates**, F. E. L. , 2017, 152p, 15 €.

En la universitata teatro devas baldaŭ komenciĝi la fina prezentado de verko de loka dramisto; sed en sia kostuma ĉambro unu el la roluloj kuŝas mortigita. Tiel estas, ke la sesan fojon kunlaboras detektivkomisaro Roberto Elis kaj universitata gardisto Petro Tomson por solvi murdenigmon. Pluroblas tiuj, kiuj havis oportunon kaj eble motivon por okazigi la morton. Kiu el ili kulpas? (el F. E. L. retejo).

3 La konflikto de la epokoj, romano, **Edwin De Kock**, F. E. L. , 2019, 468 p. 33 €.

Tiu epopeo estas la majstroverko de Edwin de Kock (1930), kreita en sep jaroj, kun longaj interrompoj, dum preskaŭ 60 jaroj, inter 1959 kaj 2018. Ĝi rakontas pri kosma batalego, kun Lucifero kaj la homdia Kristo kiel ĉefrolantoj. Per spaca kaj tera vojaĝo multjarcenta kvin gvidantoj kondukas la aŭtoron por komprenigi pri la efikoj de la interluktantaj bono kaj malbono. (el F. E. L. retejo)

4 La muzeo de milito, romano, **Claudio Magris**, F. E. L., 2019, 296 p, 35 €.

Triesto: Viro havas kiel vivcelon la kolektadon de ĉiaj ajn armiloj-pafiloj, submarŝipoj, tankoj-por giganta muzeo de milito. Ĝi devas iĝi kolekto de ĉiu malbono en la mondo, dum ekster la muzeo ekzistos nur paco. La kolektisto, tamen, mortas en misteraj cirkonstancoj, kaj tiel perdiĝas la parto de liaj notoj, kiuj enhavas la nomojn de la kunlaborantoj en la Rizejo, la koncentrejo de Triesto. (el F. E. L. retejo)

Aŭskulteblaj voĉoj en Esperanto per tiuj podkasto

En la retpaĝo <http://punkto.info> kuniĝas podkasto kaj aliaj retaj projektoj Preskaŭ ĉiusemajne aperas nova epizodo de la podkasto kern.punkto pri io ajn en Esperanto, sed ne pri Esperanto. Jen la lastaj temoj:

- KP184 Svarma inteligenteco - Ara konduto de bestoj, homoj kaj robotoj

Pliaj epizodoj vi povas trovi en la arkivo: <https://kern.punkto.info/arkivo/>

Kelkfoje okazas tujaj elsendoj. Pliaj informoj: <https://kern.punkto.info/tuje/>

Neregule aperas la epizodoj de la podkasto movada-vid.punkto pri Esperanto-movadaj temoj. Jen la lastaj temoj:

- MvP023 UEA estraro - Interparolo kun du membroj de la novelektita estraro de UEA

Pliaj epizodoj vi povas trovi en la arkivo: <https://movada-vid.punkto.info/arkivo/>

Kelkfoje okazas tujaj elsendoj. Pliaj informoj: <http://movada-vid.punkto.info/tuje/>

Ĝuu la aŭskultadon hejme aŭ survoje.

Informas Julia

Sen Familio en Esperanto

Fine de aŭgusto 2020 eldoniĝis “Sen Familio”, franca romano verkita de Hector Malot, kaj esperanten kuntradukita de Ana Songanta kaj de Michel Fontaine, sam-asocioj de Esperanto- Bourg en Bresse kaj de Esperanto-France. Jam disvastiĝis informo tra la mondo, kaj multaj reagoj jam esprimiĝis, strange plejparte en Azio.


La fama sagao de Remi, trovita infano, inspiris multajn filmoj, bildstriojn, TV-movbildojn, TV-felietonojn, spektaklojn, en multaj landoj. La asocio nome “Les amis d’Hector Malot” anoncis en sia retejo, ke, post multaj diversaj tradukoj, esperanto-traduko unuafoje ĵus aperis. Precize legante la libron, oni observas detalojn pri la tiamaj vivkondiĉoj de infanoj, kamparanoj kaj laboristoj. Ankaŭ aperas tiamaj avangardaj pedegogiaj ideoj pri edukad-principoj.

Ĉio puŝas nin konsideri, ke la verko koncernas ne nur infanojn, sed ankaŭ plenkreskulojn. Ĉiuj scivolos sekvi la surpriz-plenajn emociigajn aventurojn de Remi, de lia mastro Vitalis, de la dresitaj bestoj Capi, Zerbino, Dolce kaj Joli-Cœur. Finfine, ĉu Remi retrovos sian familion?

En la 25a de aŭgusto 2020 la belaspekta libro, estis printita je kvarcent kvardek ekzempleroj, ne pli multaj disponeblas, aĉetitaj jam de ĉirkaŭ ducent “klientoj”.

Se vi deziras akiri, urĝe mesaĝu al unu el tradukistoj: mifonto@gmail.com aŭ al chorokgang@naver.com. Nuna prezo: 20 eŭrojn inkluzive de sendokosto. En via mendo-mesaĝo, bv precizigu vian poŝtan adreson.

Michel Fontaine



Malnova libro

En la lasta tempo mi ekagis por forĵetado de malnovaj aŭ neuzablaj aĵoj kaj libroj. En tiuj ankaŭ estas esperantaj, kiujn mi fakte ne plu malfermos estonte.

Tamen, en la malnova skatolo mi trovis la unuan lernolibron de ITO Saburo, kiu mizere dormis inter aliaj libroj. La kovrilo deŝiriĝis parte kaj la enaj paperoj tute ŝanĝiĝis al flavaj aŭ brunaj koloroj. Ĝi estis originala lernolibron de gvidanto ITO.

Sur la kovrilo estas skribita “La Elementoj de la Viva Esperanto”

La 3-a reviziita eldono, 1961.

En la unua paĝo, li skribis: Kio estas Esperanto?

Esperanto estas artefarita, internacia, komuna lingvo. Ni nepre devas lerni ĝin. Ĉar ni vekiĝu de la nuna vivo kaj progresigu la socion kaj estu feliĉaj.

Kio estas artefarita?

La artefariteco signifas, ke la homoj klopode kreis ion kun memkonscio, volo, pasio, racio kaj idealo.

Tute ne estas ruza artifiko aŭ kaprica ideo. Ĉi tiel li skribis japane sian opinion pri la lernolibro en pli ol 10 paĝojn. En tiu tempo preskaŭ ĉio fuĝis el mia cerbo, refoje nun mi legis ĝin.

Sanpei keiko el Sendaj Japanio

Kunveno en Belfort

La 16an de Oktobro (vendrede) je la 19a kaj duono okazos la venonta renkontiĝo en Belforto, en la kafejo "la dolĉa Velo".

Tie oni povas manĝi ŝmirpanojn kaj aliajn aĵojn, trinki koktelojn...

Bonvolu sendi mesaĝon al

<griffon.annie@free.fr>

por informi ŝin, ĉu vi partoprenos. Tiel ŝi povos rezervi.

Ni respektos la sanitarajn regulojn.

Jen la adreso de la kafejo: "La Voile sucrée"
2 rue du Docteur Fréry, Belfort

LUMINESK

Nova silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio

28.12.2020 - 03.01.2021
Münster / Germanio

LUMINESK' estas la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto Asocio. Ĝi nun okazos la sesan fojon kaj fariĝis posteulo de la iamaj "Internaciaj Festivaloj" private organizitaj. Ankaŭ ĉi-foje ĝi ofertas varian kaj altkvalitan programon - lingvokurson, prelegojn kaj diskutgrupojn, ekskursojn kaj distrajn programerojn. Partoprenantoj kutime venas el 7-8 landoj.

Luminesk'-kunvenejo estos la junulara domo de Münster, kiu situas apud la lago Aasee meze en la urbo. La domo estas moderna, ĵus plia konstruaĵo estis aldonita. Necesejo kaj duŝo situas en la ĉambro. La nuna domo estis konstruita en la jaro 1992. Sufiĉe apude situis la malnova junulargastejo, kiu havas faman historion en la Esperanto-mondo:



Kotizo

ĝis 2020-10-31	poste
425 €	439 €

La kotizo inkluzivas la restadon de la 28a de decembro 2020 vespere ĝis la 3a de januaro 2021 matene (loĝado en dulita ĉambro, tri manĝoj tage, programo kaj silvestra bufedo). Unulitaj ĉambroj estas haveblaj por krompago de **22 €/nokto**. Ekskursoj estas pagendaj aparte.

Eblas **partatempa** partopreno je kotizo de **80 eŭroj po nokto** (inkl. 3 manĝoj kaj programo).

Tagaj gastoj pagas **45 Eŭrojn** (inkl. 3 manĝoj kaj programo).

Atentu: Ĉi-jare Luminesk' daŭras nur ses noktojn, pro organizaj kialoj flanke de la domo.

Pago

Aliĝo ekvalidas per **antaŭpago de 50 €** al jena konto de Germana Esperanto-Asocio:

IBAN: **DE53 5058 1952 0040 1158 42** (Sparkasse Odenwaldkreis)

BIC: **HELADEF1ERB**

Pagcelo: Luminesk' 2020 Münster + via nomo aŭ per UEA-Konto **geaa-n**.

Bonvolu ĝiri la restsumon ĝustatempe antaŭ la komenco de la

Kontakto: Andreas Diemel
Retpoŝto: demandoj@luminesk.de,
ene de Germanio: 0800 3 36 36 36 64 (senkosta)
internacie +49 203 29 64 877 (fiksreta)

Aliĝilo kaj pliaj informoj ĉe: <https://www.esperanto.de/eo/enhavo/pri-luminesk>

Okaze de bezono, nia kasisto pretas peradi viajn antaŭpagojn kaj pagojn. Bonvolu kontakti lin: andreo.ag16@sfr.fr



Aliĝilo

Mi partoprenos

tuttempe

parttempe de _____ ĝis _____

Mi volas manĝi vegetare vegane

Mi ŝatas dulitan unulitan ĉambrojn*

Mia nomo aperu en la reta listo de aliĝintoj

Mi antaŭpagos 50€ per

IBAN-ĝirado UEA-Konto

ĝis plej malfrue la _____-an de _____ 2020

Staĝo de Tut-pirenea Esperanto-Koruso



De la 20a ĝis la 27a de februaro 2021 en Arjeĵujo en la feriejo La Bastide en HERS (Ariège)

Venont-vintre venu en Arjeĵujon por tutan semajnon plurvoĉe kunkantadi kun la kvarfoja gvidado de Nederlandanino el la kant-grupo "AKORDO" Rineke HOENS.

Ŝi gvidos divers-nacian kaj divers-nivelan aron da Esperanto-scipovantoj kaj gekursanoj tra diversaj epokoj kaj diversaj stiloj de la Esperanto-reperduaro.



Ĉiutage ni kantas 5 horojn kaj povos plie turismi, debati, ludi, lerni Esperanton, laŭplaĉe kaj eĉ eventuale skii. Krome pluraj partoprenantoj ankaŭ folk-muzikemaj alportos siajn instrumentojn por eventuale ludi kun lokuloj : Gérard, Patrick, Alyson kaj aliaj.



Programo: ĉiutage 5 horoj da kantado, kulturaj kaj turismaj vizitoj, ekskursoj kaj vesperaj ludoj, debatoj, spektakloj, ktp.

Akcepto: ekde sabato la 20an de februaro je la 15-a horo.

Staĝo-eko: dimanĉe la 21an de februaro je la 9-a horo.

Staĝo-fino: sabate la 27-an de februaro je la 15-a horo.

Aliĝo-kondiĉoj: CEEA-aniĝo (pro asocia asekuro): normale: 16€, rabatite: 11€, paro: 24€, infanoj: 5€

Enskribiĝo por la semajno : malplikoste se pli frue, pli junaĝe aŭ plurope el sama familio.



ALIĜILO:

Kompleta adreso:

.....

 Tel.....

Ret-adreso.....
Mi alvenos trajne en Toulouse/Pamiers

jela-a h. (sekve buse en *Laroque d'Olmes*) aŭ en *Bram* je-a h.

Mi enskribiĝas, kiel : ***akompananto** /__/
 ***korusano** /__/
 basa /__/
 tenora /__/
 alda /__/
 soprana /__/
komencanta /__/
konfirmata /__/

Mi leg-kapablas : - Esperanton Muzikon /__/
 deziras jam ricevi partiturojn /__/
 amatora **muzikemulo**, ludanta-on
Esperanto-komencanto & deziras baz-/
progresig-an kurson /__/

Ĉi-kunas mia pago (ĉeko al CEEA - CCP n° 257 934 E Toulouse) pri :

- 1) **Aniĝo** ĉe CEEA (devige) . _____ €
- 2) **Enskribiĝo** je l'staĝo _____ €
- 3) **Restad-kosto** _____ €, **antaŭpago 10%** _____ €
- 4) **Donaco laŭvola**..... _____ €
- 5) **Sumo** _____ € ; **nun pagataj** _____ €
- 6) **Restos por pagi** je alveno. _____ €

Okaze de rezigno repageblas nur enskribiĝ-kostoj ĝis de 15-a nov. kaj restad-kostoj ĝis 5-a de jan.

Ĉiujn sendaĵojn al :

MONIK' Garrigues – Muelejo -
FR - 09 600 LIMBRASSAC –

Informoj ĉe Jorgos Tel 33/0 468 605 417 ; rete <tutpeko@aliceadsl.fr>.

Pliaj ideoj, proponoj, petoj :

Aliĝ-kotizo laŭ aliĝo-periodo	Plenkreskulo	Ĝis 26-jara aŭ 2a persono	Ĝis 16-jara aŭ 3a persono
ĝis la 15.08.2020	60 €	45 €	30 €
ĝis la 31.10.2020	75 €	60 €	45 €
ĝis la 31.12.2020	90 €	75 €	60 €
Poste	105 €	90 €	75 €
Restad-kostoj: 7 tag-noktoj kun 3 manĝoj		301 €	
Sen tag-manĝoj		231 €	

Ni lernu per enigmoj kaj humuraĵoj

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2							■		■	
3				■						
4		■								
5	■					■				■
6				■				■		
7						■				
8					■		■			
9		■							■	
10					■					

G.J.

Noto de la kreanto de tiu ludo: Mi trovis 2 tradukojn por la nomo de la persono en la kvina kolumno, kaj mi elektis la pli simplan.

Laboristo de la anglaj fervojoj trovas viron kuŝantan sur la reloĵ. . .

“Kompatindulo, kio okazas al vi, kial vi kuŝas ĉi-tie, kia-cele?”

Mia vivo ne plu indas, mi ne plu havas laboron kaj ne plu povas pagi miajn ŝuldojn, baldaŭ mi ne plu havos loĝejon. Mia edzino forlasis min, malaperis mia fidela hundo kaj krome miaj najbaroj eĉ ne plu salutas min. Nun mi atendas la rapidan trajnon el Manĉestero, kiu definitive solvos por mi ĉiujn miajn problemojn.

Mi tamen deziras atentigi vin, ke la rapid-trajno el Manĉestero veturas sur tiu alia trako. Ĉi-tie veturas la ekspres-trajno el Londono, ja necesus ŝanĝi vian pozicion...“

En la klaso babilema knabineto informas sian instruistino:

“Sinjorino, mi naskiĝis en rozo, sed mia eta frato aperis en brasiko. . .”.

Tiam ŝia apud-sidanta amikino aldonas. . .

“En nia familio ne okazis same, mi ja simple eliris el la ventro de panjo!”.

Iom surprizita la instruisto iĝas scivolema. . .

“Kiu do diris tion al vi?”

- Kompreneble panjo! Ni ja loĝas en apartamento en la urba centro, kaj ĝardenon ni ne posedas. Tial paĉjo devis elturniĝi por trovi alian solvon!”.

Okaze de feriado en farmbieno, du infanoj loĝantaj en urbo, admiras la kokinejon. Ĝuste tiam kokino kovas ovojn.

“Mi vere ŝatus scii, kiamaniere la kokideto sukcesos eliri el la interno de la ovo.

HORIZONTALE :

1. Sudafrikano
2. Fizika grand', esprimanta kapablon fari laboron.
3. Stat' de io ardanta. Stat' de iu, kiu honoras Dion.
4. Antikva Bretonio.
5. En la unua loko. Prefikso.
6. Parto de cirklo. Komenc' de mesaĝo. Prefikso.
7. Malofta nobla gaso. Ĉirkaŭ' de la homa korpo.
8. INVERSE: larm'. Dombest'.
9. Je malgranda kvanto aŭ nombro.
10. INV: parto de la korpo. Ano de antikva Skotlando.

VERTIKALE :

1. Afrika animal'. Arterio.
2. Femalo. Ujo por voĉdonilo.
3. Grava depresia perturbo.
4. Regno-kodo de Brazilo. Regno-kodo de Rusio. Grava momento en la historio.
5. Mita reĝo de Argo dum la Troja milito.
6. Globeto kun tratruo por tredi fadenon. Korna ekstremaj' de la buŝo de la birdoj.
7. Fil' de Agamemno. Trinkaj'.
8. Kontinent'. Himenopter'.
9. Subbrako.
10. Akvomaso. Nov-zelanda nokta birdo.

Mi eĉ pli scivolemas, kiamaniere ĝi sukcesis eniri la ovon!”

En tribunalo la juĝisto laŭte alparolas akuziton:

“Akuzito, vi eniris la domon de via najbaro tra malantaŭa pordo tute senbrue....Kion vi tiam celis farante tion?”

- Efektive sinjoro juĝisto, ĉar tiam mi supozis, ke ĝi estis mia propra loĝejo.

- Sed kial vi rapide forfuĝis, kiam aperis la domposedantino?”

- Ĝuste, ĉar tiam mi tuj imagis, ke alproksimiĝas mia edzino!...“

En la elementa lernejo la instruistino petas al siaj gelernantoj redakti tekston kun la temo:

Mia patro brikolas:

Jen Alano verkis kelkajn liniojn:

“Mi desegnis por la festo-tago de patrinoj belan buntan pejzaĝon. Panjo ege ŝatis ĝin kaj eĉ ĝin enkadrigis! Paĉjo deziris fiksi ĝin sur la muron de la dormoĉambro. Sed li fuŝe martelumis sur la najlon kaj trafis

SOLVO 190 :

Horizontale:

1.KVADRICEPS. 2.LEV. AVEN. 3.ESAP. ERAR. 4. TRANSAKCI. 5.AMULET. UEL 6.MILA. INOPO. 7. ANONIMA. 8.SS. KD. BRAK. 9.OTIERK. ADO. 10. RANO. ATOM.

Vertikale:

1.KLE. AMASO. 2.VESTMINSTR. 3.AVARULO. IA. 4. PALANKEN. 5.RO. NE. IDRO. 6.ESTIM. 7.CARA. NAB. 8.EVAKUO. RAT. 9.PERCEPTADO. 10.SN. ILO ? KOM.

sian fingron. Tiam panjo eĉ devis flegi la vunditan fingron!“

“Sed bedaŭrinde panjo malpermesis al mi, skribi, kion paĉjo ekkriis, kiam la martelo mistrafis la najlon!”

Ĉe la eniro al aŭtovojo policisto haltigas veturilon. En la kofro li trovas valizon plenan je monbiletoj.

“Strange!” surprize reagis la stiranto...

“- kion vi planis fari per tiu grandega sumo?”

- Tut-unue, mi devas pagi la lecionojn pri aŭto-stirado kaj fine trapasi ekzamenon!“

Al tio respondas virino sidanta apude:

“Ne kredu lin, kiam li estas ebria li tiel daŭre ŝercas!“

Malantaŭe, sidanta pasaĝero intervenas:

“Mi ja antaŭ-supozis, ke pro tiu ŝtela aŭto, ni spertos multe da malagrablaĵoj!“

Virino babilas kun amikino kaj profitas la okazon por peti konsilojn por vendi sian malnovan aŭton. Fakte la kilometro-nombrilo jam indikas 289 000 kilometrojn!

La amikino proponas:

“Ĉu eventuale vi pretas solvi la problemojn iom neleĝe?”

- Kial ne?

- Mi proponas, ke vi vizitu mian amikon Roberto, kiu laboras en aŭto-riparejo... Li certe sukcesos ŝanĝi la nombron da kilometroj al 50 000!“

Iom da tempo poste la du amikinoj refoje renkontiĝas, kaj scivoleme la dua demandis:

“Ĉu vi fine sukcesis vendi vian aŭtomobilon?”

- Certe ne, ĉar nun kun aŭto je nur 50 000 kilometroj, mi preferas ĝin ankoraŭ longtempe uzi!“

La paro planas festi sian 25-jaran geedziĝon. La edzino scivolemas pri la planita donaco. “Karuleto mia, ĉu vi bonvolas sciigi al mi pli la planita donaco, kiun vi ofertis al mi?”

- Nu, kara, mi imagis ion originalan, vojaĝon al Ĉinio!

- Sed, ĉu vere tiom multekosta donaco?

- Tute ne, mi jam scias. Mi iros tien por rehejmenigi vin!“

NOVA APO

Alano: “Diru, Banĉjo, ĉu vi konas la novan apon kiu tuju informas onin pri kiuj el oniaj amikoj estas absolutaj kretenoj?”

Ernesto: “Ne. Kiel ĝi nomiĝas?”

Alano: “Fejsbuko.”

MALĜUSTA TAGO

Alberto alvenas hejmen post longa, laciga tago.

Li malfermas la dom-pordon kaj salutas:

“Hu-hu! Jen mi!”

Li daŭrigas:

“Kiom misa tago! Ĉi-matene mi prenis la malĝustan buson; en la laborejo mi verkis la malĝustan raporton; mi manĝis la malĝustan tagmanĝon; kaj fine mi iris al la malĝusta kunsido! Mi estas kontenta ke mi fine atingis la hejmon!”

Subite, nekonata virino aperas:

“Vi estas en la malĝusta domo!”

KIEL KUIRI KOLBASOJN

Estas belega tago, la unua tago de la somero.

Eta Veĉjo vokas sian patron: “Paĉjo, hodiaŭ ja mi kuiras la vespermanĝon!”

Paĉjo: “Ĉu vi? Kion vi preparas?”

Veĉjo: “Krad-rostitajn kolbasetojn.”

Paĉjo: “Sed ĉu vi ne estas iom tro juna por tia tasko?”

Veĉjo: “Ĉio en ordo, paĉjo. Panjo ekfajrigis la krad-rostilon kaj metis la kolbasetojn sur ĝin. Ŝi diris ke mi voku ŝin kiam ili estas finkuiritaj, kaj ŝi venos por forpreni ilin.”

Paĉjo: “Jes, mi vidas, ke vi kuiras.”

Veĉjo: “Mi havas nur unu demandon.”

Paĉjo: “Kio ĝi estas?”

Veĉjo: “La kolbasetoj fariĝis tute nigraj. Ĉu vi opinias, ke ili estas finkuiritaj?”

Ludiloj

“-Panjo, ĉu vi aĉetu ludilon por mi?”

- Jes, Danieleto: kion vi deziras?

- Mi preferas ludilon, kiu tute ne estus interesa por paĉjo.”

Neĝado

Dum iom da tagoj la lernejo restis fermita pro abunda neĝo. Kiam ĝi malfermiĝis, la instruistino demandis al peĉjo:

“- Ĉu vi profitis la okazon por ion fari?”

- Jes, mi preĝadis, por ke la neĝado daŭru!”

Rakonto: Pastrado kaj la pomarbo.

Pastrado plantis pom-arbon en sia ĝardeno, kiam ĵus pasis la princo; li haltis kaj alparolis mokeme Pastradon: “Komprene Pastrado, vi vane laboras. Neniam vi manĝos la fruktojn de tiu pomarbo. Vi ja scias, ke vi mortos antaŭ ol ĝi produktos pomojn.”

Al tio Pastrado respondis:

“- Ho princo! Ni manĝas la pomojn de la pomarboj plantitaj de niaj patroj kaj niaj gefiloj manĝos la fruktojn de la pomarboj plantitaj de ni.”

Tiu saĝa respondo plaĉis al la princo, kiu rekompence donis or-moneron al Pastrado.

“- Ho princo! diris Pastrado prenante tiun moneron, jen kiel tiu pomarbo jam donis frukton.”

Tiu rimarko ridigis la princon, kiu donis al li duan or-moneron.

“- Estas eĉ pli eksterordinare, ekdiras Pastrado. Jen pomarbo, kiun eblas rikolti eĉ du-foje jare.”

La princo ekridegis kaj donis eĉ trian or-moneron al Pastrado.

Juna knabino sidas sur benko en la parko kaj tenas grandan kuketon en ĉiu mano. Maljuna viro pliproksimiĝas al ŝi kaj rimarkas, “Sciu, ke manĝi tiom da kuketoj estas danĝere por la sano kaj dikigos vin”

La knabino respondis, “Nu, mia avo aĝis 102 jarojn.”

La viro skuis la kapon kaj diris, “Kaj ĉu ankaŭ li manĝis tiom da kuketoj?”

La knabino respondis, “Ne, sed li ja sciis ne ĝeni aliajn homojn.”

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2021 ĝis 2023

Nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevataj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta $20 - 66\% = 6,80$ eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

La atestoj rilatas al pagoj de kotizoj kaj donacoj ricevataj en 2020 (principe ĝis la 31a de decembro) por la imposto-deklaro de 2021.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2020, pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la ĉi-suba tarifo. Ni povas ankaŭ proponi al vi retan version en formato pdf favor-koste kompare kun la papera versio.

Krome vi povas elekti inter la 2 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

		Jaroj:	2021	2022	2023
		Abono por la papera versio:	18 eŭroj	18 eŭroj	18 eŭroj
		Abono por reta versio en formato pdf:	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
UEA 2021	MB	• Individua Membro Baza, kun reta aliro aŭ UEA-servoj: reta revuo Esperanto, Delegita Reto (reta jarlibro)			44 eŭroj
	MA	• Individua Membro-Abonanto: kun ĉiuj retaj servoj, kiu aldone ricevas la revuon Esperanto papere			74 eŭroj
Pag- manieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize menci la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2021 por 1208				
	2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2021, 2022				
	3. Per internacia aŭ reta ĝiro je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu menci la celon de via pago kaj vian adres-kodon)				

Libroj eldonitaj de Esperanto France-Est aŭ akireblaj ĉe nia kasisto

"De Karlis al Carlo Rememoroj"

Kortuŝa rakonto pri la travivaĵoj de Carlo Nicolodi en malfacila periodo de la dua mondmilito, de Latvio al Italio, filo de Esperanto-paro, latva kaj itala. 12 + 3,80 = 15,80 eŭroj

Momerige al Roger Imbert (1938—2009)

Li ne iĝis profeto en sia lando (Francio) sed eminenta esperantisto en Zagrebo (<kroatio) 4+1,90=5,90 eŭroj

Paul-Georges KOCH (1908 - 1982)

Eta selekto de poemoj tradukitaj el la germana fare de E.Ludwig 1,50 + 1,90 = 3,40 eŭroj

Knabaj petolaĵoj Poemoj de Gérard LESER en la alzaca,

tradukitaj al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 1,90 = 3,40 eŭroj

La harplektaĵo de Sylvie Reff Poemoj en alzaca

kun traduko al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 1,90 = 3,40 eŭroj


Etaj rakontoj pri al Katedralo de Strasburgo

Ĝin verkis kaj kompilis Sūzel PAILHES. Ĝi aperis en 12 lingvoj. En la Esperanto-versio ankaŭ aperas la hispana kaj la rusa lingvoj, 48-paĝa libro kun tre solida kovril-paĝo 12 + 8 = 20 eŭroj

"Gardu vin, knabo!" Historiaj rememoroj de Armand Hubert dum la dua mondmilito. 1 + 1,90 = 2,90 eŭroj

Konstruado-kajero de TAKE 2020

La ĉi-jara temo estas "Fenestroj" kun 9 artikoloj de diversaj aŭtoroj 8+1,90=9,90 eŭroj




Eldonita de ESPERANTO FRANCE-EST

Nova eldonaĵo de EFE

Nia asocio ĵus eldonis novan libreton *"GARDU VIN, KNABO!"* Jen Armand Hubert sukcesis kolekti rememoraĵojn pri la travivaĵoj de sia familio kaj de Lorena vilaĝo dum la Dua Mondmilito. Kortuŝaj rakontoj kun suferoj kaj esperoj dum la departemento Mozelo estis aneksita kaj germanigita de naziaj soldatoj.

La libreto estas mendebla ĉe nia kasisto:
1 eŭro + 1,90 = 2,90 eŭroj



Baldaŭ mallonga filmo en Esperanto



Anne Vernet iĝis voĉa aktorino de mallonga filmo de Olivier en Mulhouse.

Jen ŝi rakontas pri siaj taskoj:

Dum la izoliĝo-periodo mi estis kontaktita de instruisto pri historio de Mulhouse, pasia pri kino kaj aŭtoro de multaj mallongaj filmoj. Olivier, tiel li nomiĝas, serĉis virinan voĉon parolantan Esperanton por sia sekva mallonga filmo. Nur voĉo, la bildoj estis jam filmitaj. Olivier ne estas esperantisto (ankoraŭ ne); do li skribis la tekston en la franca, kaj uzis komputilan tradukilon (guglo) por traduki. La tradukaĵo ja necesis iom da korektado kaj polurado. . .

La filmeto temas pri. . . viruso! Sufiĉe nekredible, ĉar ĝi estis imagita antaŭ la komenco de la kronviroza epidemio. . .

Mi havis kelkajn semajnojn por alproprigi la tekston ĝis la rendevuo en registro-studio situanta en Sundgau, (suda Alzaco) la 13an de junio. Ni pasigis la posttagmezon por registri la diversajn sekvencojn,

sub la superrigardo de Olivier, en tre amika etoso. Bildoj kaj sono estas nun en la skatolo. Restas la granda laboro por kunmeti sonojn kaj bildojn, aldoni muzikon kaj subtitolojn. . .

Mi scivolemas vidi la rezulton! La oficiala prezento de la filmeto verŝajne okazos printempe en Mulhouse. Lokaj esperantistoj estos invititaj!

Aktivado de la grupo de Nancio en 2019

Esperanto Nancy 54 daŭre aktivis dum - 2019, kvankam la steloj ne estis tre favoraj tiujare, Kurso funkciis kun 1 komencanto, 1 progresanto kaj...5 instruantoj!

Gisèle daŭre efike prizorgis la retejon esperanto.nancy.fr,

La grupo festis: flavesperon la 9an de januaro kaj Zamenhof feston la 13an de januaro.

Membroj partoprenis diversajn regionajn aranĝojn: en Strasburgo, Mulhouse, Luksemburgio...

Kaj prezentis la lingvon en Vandoeuvre la 15an de junio (récré-anim), en Fontenoy la Joute, en la festo de Asocioj en la Arbidejo en Nancy la 22an de septembro kaj en Festi la Vida, en Vogezoj aŭtune.

Bedaŭrinde, pro la akcidento de Liliane, ni rezignis la planitan promenadon ĉirkaŭ la vilaĝo de la Blua Kato, dum somero.

Ni aktive preparis la komunan semajnfino okazontan en Art Sur Meurthe, en marto 2020 per programado, tradukado, varbado... sen scii, ke la verdaj steloj ne kapablos protekti nin!

Amika tago en Freiburg la 22an de aŭgusto 2020

La grupo de Freiburg sukcesis daŭrigi la tradicion de niaj "Amikaj Tagoj", malgraŭ la daŭre minacanta viruso. Tamen necesis iom atendi, ke la land-limoj estu malfermitaj.

Tial ĝi ne povis okazi en junio sed nur en aŭgusto

Amika Tago en Freiburg

La stacidomo de Freiburg estas taŭga rendevuejo por la homoj loĝantaj en la proksimeco kaj por tiuj, kiuj povas oportune uzi la regionajn fervoj-liniojn. Iom antaŭ la 11a matene grupo ariĝi en la ĉefa halo de la stacidomo. Certe ni ne estis multnombraj, nur 8 partoprenantoj el Germanio kaj Francio. Tre verŝajne iuj ankoraŭ ne aŭdacis transiri la lanlimon.



La proponita celo estis unue ĝui la panoramo al Freiburg de sur Kanonenplatz. Unue ni promenis en la urbo kaj poste veturis per kablo-trajno por atingi tiun lokon. De tie estis bela panoramo kun en la fono la Vogezoj.



Poste ni daŭrigis nian promenadon, kiu finfine daŭris iom pli longe ol ni unue supozis. Efektive ni marŝis ankoraŭ 5 km sur preskaŭ ebena vojo. Survoje aperis ĉarma fontano, kie eblis preni akvon bezonatan por sensoifiĝi.

Feliĉe ni bone atingis la cel-lokon ĉe restoracio kaj preĝejo de sankta Otilia. Tiam estis jam la 14a horo, tial bonvenis unue trinkaĵoj, bieroj, vinoj, sukaj kaj manĝaĵoj por ĉiuj. Malpli bonvenaj estis svarmantaj vespoj ĉe nia



tablo.

Post plena kontentigo ni ja povis viziti la preĝejon de Sankta Otilia.

Tiam neniu plu deziris reveni laŭ la sama vojo, tial Ursula proponis pli mallongan vojon malsupren por tie atingi tramo-stacion.

Survoje ni trovis agrablan lokon por trinki kafon aŭ manĝi glaciaĵon.

Laŭ la propono de Julia ĝi estis organizita en la kadro de "Paralela Universo".

Ni dankis pro la bona organizado de tiu tago kun la espero, ke venont-jare ni estu pli nombraj. Nia Amika Tago ja plu vivas.



Staĝo en Métabief de la 23a ĝis la 29a de aŭgusto

Métabief estas montara urbeto en Ĵuraso je alteco de 1000m Jam de 5 jaroj estas proponitaj staĝoj en la ĉaledo "Les sapins de l'Amitié", "La abioj de la amikeco".

Ĝi disponas pri 2- kaj 6-litaj ĉambroj ĉe la unua etaĝo. Necesejoj kaj sanitariaj instalaĵoj estas plej ofte apartaj.

Tial la komforto estas pli modesta ol en aranĝoj kiel en Hispanio, suda Francio kaj Germanio.

Malgraŭ tio la etoso estis tre agrabla kaj la servitaj manĝoj vere bongustaj kaj variaj.



Kutime okazas pluraj kursoj, ankaŭ por komencantoj. Tamen ĉi-jare pro la pandemio ne venis eksterlandaj partoprenantoj, sed ĉefe samideanoj, kiuj ja ne povis partopreni la kutimajn kongresojn kaj internaciajn aranĝojn kaj tamen deziris ĝui Esperantan etoson.

Jen Métabief, fine de aŭgusto taŭgis tia-cele kaj por iel kompensi la ĝis-nunan devigan hejm-restadon kaj mankon de vojaĝoj al eksterlando.

La programo konsistis el prelegoj kaj kursoj en la mateno. En la posttagmezo estis proponitaj diversaj ekskursoj kaj vizitoj en la regiono, kie ja abundas pluraj vidindaĵoj. Je la 17a horo denove okazis la kursoj, kiujn akurate ĉeestis

la plej diligentaj.

Renée Triolle lerte kaj kompetente gvidis la 3a-gradan kurson kun plej diversaj diskutindaj temoj. Ŝi sukcesis krei agrablan etoson inter la ĉeestantoj.

Post la vespermanĝo okazis interesaj prelegoj aŭ prezentado de diversaj fotoj pri vojaĝo.

Luc Allemant el Svislando rakontis pri sia naŭmonata vojaĝo per biciklo laŭlonge de la Danubo ĝis Rusio. Survoje li travivis interesajn spertojn kaj renkontis afablajn homojn, esperantistojn, Esperanto-grupojn kaj havis agrablajn kontaktojn.


En Ukrainio li estis intervjuita de loka televid-stacio.

Jen finfine li atingis la vastan landon Rusio, tie li



povis kontakti loĝantojn kaj eĉ tranokti ĉe kamparanoj. Ĉie li estis bonvena kaj amike akceptita.

Nathalie Rigault prezentis sian 4 monatan vojaĝon per ĉevalo tra okcidenta Francio kun etapo en Gresijono. Ŝi verkis libron pri ĝi en la franca lingvo, en kiu Esperanto estas menciata. La titolo: **"Voyager autrement"**



Métabief troviĝas proksime al la svisa landlimo. Tial unu el la ekskursoj celis la grotojn de Vallorbe en Svislando.



La enirejo de la kaverno situas je alteco de 750m. La fonto de la rivero Orbe, kiu tra sifono senakvigas la kaverton situas je alteco de 776m m. La kavofluo de Orbe tra la kaverno estas inter 2 m³/s kaj 80 m³/s. La ekzakta longeco de la kaverno-sistemo ne estas konata, ĉar ĝis nun estas esplorita nur parto de ĝi, sed ĝi verŝajne superas 4 kilometrojn. La alteco-diferenco de la vizitebla parto estas 228 m. La aera temperaturo en la kaverno la tutan jaron konstantas de 8° ĝis 10 °C, dum la kavotemperaturo varias inter 4° kaj 13 °C.



Aparte interesa estis vizito al la fuorto de Lucotte de Sankta Antonio. Ĝi estis starigita post la milito de 1870. Tamen nur mallonge uzata. En 1966 la fuorto tute ne plu estis uzata. Marcel Petite, fromaĝisto, ĝin akiris kaj tie instalas fin-maturigejon por la fromaĝoj "Comté". Tie estas staplitaj miloj da fromaĝoj, kiuj maturiĝas de 12 ĝis 36 monatoj.

Dum la vizito eblis vidi multege da fromaĝoj kaj la mekanismon por ilin turni kaj brosi unu aŭ dufoje jare.

Nekredeble, entute troviĝas tie 100.000 fromaĝoj. Ni povis iom gustumi kaj provi ekkoni la kaŝitan krom-guston. Ĉiu fromaĝo havas sin apartan trajton, tial necesas la decido de fakulo, kiu per gustumado taksas pri la fina maturiĝo. La fromaĝo-produktantoj

troviĝas en tiel nomataj "Fruitières" diversloke sur la montaro Ĵuraso. Ĉiu-tage estas liverataj proksimume 400 fromaĝoj kaj sama kvanto vendata en Francio kaj al eksterlando.



Jen post la ekskursoj la plej diligentaj lernantoj akurate revenis por ĉeesti la kurson de Renée Triolle. Ŝi instigis al legado de diversaj tekstoj kaj sekvis diskutado. Ni traktis diversajn temojn: pri rubaĵoj, kafo, topinamburo, pandemio, atom-centraloj, sekreta vivo de lavmaŝinoj, Marjorie Boulton, judoj kaj holokaŭsto, indiĝenaj lingvoj en Sudameriko, mikro-kreditoj, ktp.

Jen la monto Morond atingebla per telfero. Ĝi estis la celo de la merkreda ekskurso kun pikniko surloke. Plej multaj preferis iri per la telfero. Kuraĝuloj iris piede supren. Vasta panoramo aperis al diversaj ĵurasaj mont-pintoj sed ankaŭ al la blanka monto en la Alpoj.



Iom pli malsupre troviĝis la lago de Morond, atingebla tra iom krutaj kaj ŝtonozaj vojoj, malgraŭ asertoj pri ebenaj vojoj. Tie ĉe la lago troviĝis oportunaj tabloj kaj benkoj por akcepti la piknikantojn kaj ĝui agrablajn momentojn.



Poste iuj preferis plu grimpi al monto "Mont d'Or", aliaj ĉirkaŭis la lagon antaŭ ol supren-grimpi al reven-vojo. Tie supre, jen videblis la Blanka Monto.



La Blanka Monto



Ĵaŭde vizitis la staĝon du instruistoj: Emmanuel DESBRIÈRES kaj Alexandre ANDRÉ. Ili instruas en francaj lernejoj kaj rakontis pri siaj spertoj por la enkonduko de Esperanto, per la metodo "Tendaraj tagoj" kaj pri interŝanĝoj kun aliaj lernejoj kaj pri vojaĝo kun lernantoj al Slovenio.

Ili ricevis favoran respondon por eksperimente proponi instruadon de Esperanto en la lernejoj.



Les directeurs d'école et chefs d'établissement souhaitant proposer à leurs élèves une démarche expérimentale intégrant l'enseignement de l'espéranto pourront, le cas échéant, rentrer en contact avec les conseillers académiques en Recherche-développement, innovation et expérimentation (CARDIE). Les coordonnées de ces interlocuteurs privilégiés sont disponibles sur le site EDUSCOL.

Je vous serais enfin reconnaissante de faire parvenir à mes services les conclusions de l'évaluation annuelle de cette démarche expérimentale.

Je vous prie d'agréer, Monsieur, l'expression de mes salutations distinguées.

La directrice générale de l'enseignement scolaire

[Signature]
Florence ROBINE

Fotoj kaj tekstoj de Andreo

Jen bela konkludo de tiu agrabla semajno en simpatia familia etoso. Ni danku al la organizantoj, ĉefe al Anne-Marie FERRIER



La 6-a Esperanto-staĝo en METABIEF

La aranĝo okazis de la 23-a ĝis la 29-a de aŭgusto 2020 en montareca pejzaĝo de ĵurasa regiono en la vilaĝo *Metabief* proksime de la svisa limo. La aranĝon organizas la klubo de “Esperanto *Chalonnais*” sub la gvidado de Anne-Marie Ferrier jam la sesan fojon. Tiu ĉi jaro estos memorata kiel la jaro de tutmonda pandemio Kovim-19 (kronvirusa malsano 2019).

Ni loĝis en montara junulara gastejo *Les Sapins de l'Amitié* (La abioj de Amikeco), kiun prizorgas la asocio *Claj* (*Clubs de loisirs et d'action de la jeunesse*). La direktoro Djemel Zeffane afable bonvenigis nin kaj donis informojn pri la domo kaj pri la striktaj kondiĉoj pro la Kronviruso. Ni devis uzi maskojn, krom dum la manĝado kaj dum la instruado. Ekster la domo estis laŭvola uzado de ili.

La unua vespero komenciĝis per la bonveniga aperitivo kaj poste sekvis prezentado de la ĉeestantoj. La aranĝon partoprenis dudek tri geesperantistoj el Francio kaj unu el Svislando. La programo konsistis el matenaj kaj antaŭ-vesperaj E-kursoj, posttagmezaj ekskursoj al diversaj lokoj kaj la vesperoj estis dediĉitaj al prelegoj aŭ ludoj. Per diversaj ekskursoj la partoprenantoj povis malkovri interesan regionon, promeni en la ĉirkaŭaĵo, bicikli al diversaj partoj en tiu angulo situanta proksime al Svislando. Agrablaj por rigardi estis matenaj sunleviĝoj, vesperaj sunsubiroj kaj unufoje eĉ ĉielarko beligis la horizonton.

Plej fluajn parolantojn Renée Triolle instigis al legado de diversaj tekstoj kaj sekvis diskutado. Ni traktis diversajn temojn: pri rubaĵoj, kafo, topinamburo, pandemio, atom-centraloj, sekreta vivo de lavmaŝinoj, Marjorie Boulton, judoj kaj holokaŭsto, indiĝenaj lingvoj en Sudameriko, mikro-kreditoj, ktp. Ne mankis iom da gramatika ekzercado. Luc Allemand kaj Jacqueline Poux gvidis kurson por progresantoj. Libroservo proponis E-librojn. Andreo Grossmann prezentis kajerojn de TAKE pri konstruado.

Post la bona kaj abunda tagmanĝo ni povis elekti diversajn ekskursojn. Interesa estis vizito al la

mezepoka kastelo *Fort de Joux* transformita al fortikaĵo. Ĝi havas la plej profundan puton (120 metrojn) en Eŭropo. Ne malpli interesa estis vizito al grotoj de *Vallorbe*, situantaj en Svislando. La kavernoj estiĝis pro la subtera elfluo de *Orbe* el la lago de *Joux*. En Svislando ni vizitis ankaŭ la muzeon *Baud* de mekanikaj muzikiloj. Kelkaj el ili estas veraj unikaĵoj.

Alia interesa vizito gvidis nin al la fromaĝejo Marcel Petite. *Fort Saint Antoine* estas malnova militfortikaĵo transformita al kelo por maturigado de la fromaĝo *Comté*. Ĝi estas unu el la plej ŝatataj fromaĝoj. Impresis altaj stokoj da plur-kilogramaj fromaĝ-diskoj. Feliĉe la laboro estas aŭtomatizata.

En la “Domo de la rezervejo” sur areo je 500 m² estas instalitaj interagaj ekspozicioj dediĉitaj al faŭno kaj flaŭro de la ĵurasa montaro. En proksimeco oni povas promeni ĉe la lagoj de *Remoray* kaj de *Saint-Point*, kiuj estas bone rimarkeblaj el belvidejo en alteco je 940 metroj. Kelkaj el ni biciklis al pli foraj lokoj. En *Metabief* ni vizitis fromaĝejon de *Mont d'Or*, kie oni povas aĉeti diversajn fromaĝojn kaj aliajn regionajn produktaĵojn.

Ĵaŭde ni havis la plezuron akcepti viziton de Mireille Grosjean kun amikino ŝia. Mirejo regalis nin per ĉokoladaj bombonoj “Merci”. Venis ankaŭ du instruistoj: Emmanuel DESBRIÈRES kaj Alexandre ANDRÉ. Ili instruas en francaj lernejoj kaj rakontis al ni pri siaj spertoj pri enkonduko de Esperanto, pri interŝanĝoj kun aliaj lernejoj kaj pri vojaĝo kun lernantoj al Slovenio.

Vespere Renée Triolle prelegis pri la interesa vivo de Victor Lebrun, kiu estis franca esperantisto kaj iama sekretario de Leo Tolstoj. Alia ŝia prelego temis pri famaj virinoj en Esperantujo. Luc Allemand rakontis kaj per bildoj ilustris sian vojaĝon per biciklo ĉirkaŭ la Nigra maro. Alian interesan (kvar-monatan) vojaĝadon per ĉevalo prezentis Nathalie Rigault. Ni ankaŭ ĝuis ludadon de liro fare de Luc Allemand.

Post longa tempo sen fizikaj E-renkontiĝoj ni povis ĝui agrablan semajnon en bona familia etoso.

Liba Gabalda



Nia foto-paĝo



**En Alzaco:
muzikas la
akvo**



**En Slovakio:
fungoj kaj
hotelo por
insektoj**



**Tra somero kaj
tra Eŭropo**

**En Belorusio:
survoje al lago**

